# INTERNI

estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

**Numero 242** **Junio, 2006**



**Laborantoj:**

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:
Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5



**Abona kosto por Kanado estas $8, por Usono $12, kaj por aliaj landoj estas $20**


☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

## SLOVENIO

Verda lando ĉe la suna flanko de la Alpoj

Unue mi petas atentigi vin: oni devas distingi inter Slovenio, Slovakio kaj Slavonio! Slovakio estas ŝtato inter la Danubo kaj la Tatra Montaro; ĝi estis iam parto de Ĉeĥoslovakio. Slavonio estas parto de Kroatio. Tamen, **Slovenio**, antaŭe unu el la ses jugoslaviaj respublikoj, estas de 1991 memstara ŝtato kun sia propra kulturo, lingvo kaj ekonomio.

Ne temas pri grandega lando. Slovenio okupas nur iom pli ol 20 000 kvadratajn kilometrojn, el kiuj duono estas arbaroj. Estas nur 43 kilometroj da mediteranea marbordo. En tiu tera florpoto loĝas du milionoj da homoj. Kaj ĉio estas verda. En neniu alia eŭropa lando troviĝas tiom abundo da verdaĵo[1].

La plej alta montopinto en Slovenio estas Triglav en la Julianaj Alpoj, kiu altas je 2864 metroj. La monto estas kvazaŭ sanktaĵo inter la slovenoj, kaj la plimulto estas konvinkita, ke ili devas surgrimpi ĝin[2] almenaŭ unufoje en la vivo, malgraŭ tio, ke la vojo estas tre laciga kaj danĝera.

Malsupre, en la direkto de Panonio, estas vinregiono, kie estas multaj malgrandaj vinberejoj. Aparte interesaj estas la orientslovena stiria kaj rizlingaj blankaj vinoj. Estas ankaŭ milda acida rozkolora vino kiun trinkas hejmlandanoj kaj malsanuloj (por resanigi la stomakon). Tie, inter la verdaĵo de 80 specioj de indiĝenaj plantoj, loĝas ursoj, sovaĝkatoj, cervoj, kapreoloj, marmotoj, sovaĝkaproj, eĉ lupoj kaj agloparoj.

Sub la tero kaŝiĝas miloj da naturkavernoj kaj abismoj. Proksimume 6500 el ili estas esploritaj kaj mezuritaj, sed ankoraŭ multaj atendas tion. La plej fama kaj plej profunda (ĝis 1300 metroj) estas la Groto de Postojna. Ĉiujare centmiloj da turistoj vizitas ĝin por vidi la barokecajn stalagmitojn kaj stalaktitojn en subtera kaverno kun longo de 20 kilometroj. En la Groto de Škocjan, sub la aŭspicio de UNESKO, estas abruptaj abismoj kaj subtera kanjono, kiu profundas preskaŭ 100 metrojn.

Alte en la Alpoj kaŝiĝas la plej maljuna lariko kiu aĝas 1050 jarojn. Sur (monto) Pohorje troviĝas la plej potenca abio, alta je 43 metroj. Ekzistas kaŝtanoj kaj longa vico de tre malnovaj tilioj, la naciaj arboj de Slovenio. Ĉie oni atentigas vin pri grandaj kaj signifoplenaj arboj. Eĉ meze de Ljubljana (la ĉefurbo) la urba administracio protektas du grandegajn platanojn, kiuj staras kvazaŭ arbaj katedraloj.

Larĝa arbarzono disigas mezan Slovenion de la alpa regiono. La venecianoj kaj aliaj mediteraneaj popoloj trovis tie la unuan veran, danĝeran, sovaĝan kaj strangan limon inter varma ĉemaraĵo kaj la malvarma interno. Tia estas la unua rapida rigardo al Slovenio, monta transirejo, plena je subitaj kaj ofte surprizaj ŝanĝoj.

Sub la signo de transireco fluis ankaŭ la slovena historio. Ĉi tie troviĝas mallarĝa suda pordo inter okcidenta Eŭropo kaj Eŭrop-Azio. En pratempoj tra tiu pordo — ĉe la supra rando de la plej norda mediteranea golfo, la Adriata maro kaj apud la sudaj piedoj de la apenaŭ paseblaj Alpoj — oni povis atingi la fabele riĉan Romon. Ankaŭ inverse, kiam la romia imperio vastiĝis orienten, tra ĉi tiuj regionoj pasis la plej grava tera vojo sur kiu la romianoj konstruis multajn soldatajn fortikaĵojn.

La plej grava estis Poetovia-Ptuj proksime de Maribor; tie troviĝas ankoraŭ nuntempe, meze de la ĉefplaco, impona romia monumento por Orfeo. Tiu ĝenas la tieajn enloĝantojn, ĉar okaze de terfosado aŭ konstruado ili jen kaj jen trovas malnovajn kulturajn atestaĵojn, kaj laŭleĝe ili devas dum certa tempo cedi la grundon al la arkeologoj.

Sur la loko kie nuntempe troviĝas la ĉefurbo Ljubljana romianoj konstruis la fortikaĵon Emona, grandan je 500 oble 400 metroj, kun altaj muroj, gardistaj turoj kaj defendaj akvokanaloj. Tia aspektis la regiono dum la unuaj kvarcent-kvincent jaroj de nia erao kaj en la postaj kelkaj jarcentoj ĉi tien alloĝiĝis la slovenoj.

Ekzistas du teorioj pri la origino de la slovenoj: la „aŭtoktona" kiu asertas ke ili estas praloĝanta tribo, kaj la „almigra" kiu sincere dirite estas pli konvinkoplena kaj pli dokumente subtenata. Laŭ la almigra teorio, la slovenoj venis ĉi tien en tiuj migre viglaj tempoj, kiam transloĝiĝis preskaŭ la tuta Eŭropo. Tio okazis en la 5a kaj 6a jarcentoj de la post-Jesua erao, kaj la slovenoj laŭ tio venis el la malantaŭaj Karpataj marĉregionoj dum pluraj almigraj ondoj.

La lingvistoj konkludas baze de escepta dialekta disparceliĝo de la slovena lingvo, ke temas pri minimume tri ondoj. Sur relative malgranda tereno kunpuŝiĝis 40

diversaj dialektoj de tri malsamaj bazaj specoj, kiuj nun parencas kun la okcident-slavaj kaj ankaŭ kun la sudslavaj lingvaj karakterizoj.

Kiam la malnovaj slovenoj antaŭ 1500 jaroj venis al la sudaj montoj de Alpoj, estis ĉi tie stato simila al la bermuda triangulo, kiu glutis unu post alia diversajn popolojn. Kiu ajn provis ĉi tie ekloĝi, emis malaperi pli aŭ malpli rapide. La premo de la okcidento estas tro forta kaj tro amasa. Ĉi tie la amasoj staris unuj al la aliaj survoje. Unuflanke ili rompiĝadis kontraŭ la romianaj muroj, kaj aliflanke ili batalis unu kontraŭ la aliaj kaj detruis sin reciproke.

Evidentiĝis, ke malfermita, videbla vivmaniero estas danĝera. Necesis akomodiĝadi kaj kaŝadi. La vivmaniero formiĝis kiel civilizo de socia migrado. En la postaj jarcentoj la slovenoj malaperis de sur du trionoj de la unue koloniita tereno, sed sur la suba, la plej mallarĝa parto, ili travivis kaj lingve kaj civilize pluekzistis, kio ja estis neniel simpla.

Ĉar ili alloĝiĝis sur vojokruciĝo, verŝajne ili rajtis tie realigi nenion kio ĝenus aliajn aŭ estus tro okulfrapa. Tial ili tre frue perdis sian ŝtaton kaj lastajn signojn de aŭtonomeco jam ĉirkaŭ la jaro 1000. (Ljubljana[3] fariĝis ĉefurbo nur antaŭ iom pli ol 100 jaroj.)

Tra ĉi tiu regiono ankaŭ la itala renesanco trairis al orienta Eŭropo. Venecianoj kaj aliaj trairis survoje al Pollando kaj Rusio. Samtempe tre efike penetris el la nordo protestantismo. Ĝis ĉi tie atingis la turkaj ekspediciaj penetroj kiuj celis al Mezeŭropo. Ĉi tie oni ludis la unuajn operojn ekster Italio. Napoleono levis la regionon ĝis la nivelo de centro por ĉiuj iliraj provincoj, iaspeca novepoka orienta imperio.

Ĉi tie realiĝis esceptaj valoroj kiaj ekzemple la Filharmonio de Ljubljana (kiu aktivas seninterrompe de 1701), la protestanta libro-eldonado (kiu eldonis la slovenlingvan biblion jam en 1584), kaj la karaktero de la kulturo agis efike daŭre dum jarcentoj. Ja ĉi tie ne ekzistis vera universitato antaŭ 1919, kvankam la slovenoj havis sian universitatan urbon kaj produktis slovenajn profesorojn. Sed tiuj ĉi aktivis tre dise tra la mondo kaj preskaŭ ne ĉehejme. Ja efikis la pera karaktero de la sloveneco: triono el la homoj kiuj fondis la „vienan universitaton" en la 14a jarcento estis slovenoj; poste en ĝi 40 slovenoj havis la oficon de rektoro, kaj multaj slovenoj estis dekanoj kaj profesoroj. Slovenaj profesoroj troviĝis ankaŭ en multaj eŭropaj universitatoj[4], de Padovo, tra Freiburg, ĝis Helsinko kaj Moskvo. Tamen ili instruis en sia hejmlando nur ek de 1918, kiam Slovenio egalrajte kuniĝis en Reĝlando de Serboj, Kroatoj kaj Slovenoj, pli poste Jugoslavio.

(daŭrigota)

— verkis Fani Riznar, Ljubljana, Slovenio

[1] Mi nepre konsentas: la verdeco de la lando estas tre okulfrapa – la kompostisto.

[2] Laŭ ***PIV***, „grimpi" estas netransitiva verbo. Tamen Claude Piron mem iam konsentis, ke oni rajtas uzi ĝin transitive – Red.

[3] Ljubljana estas ĉarma eta urbo kun rivero kun pontoj kaj kun restoracioj, trinkejoj, librovendejoj kaj muzikistoj ambaŭflanke. Tre impresis min, ke estas centoj da bicikloj en la rakoj kaj tute sen ŝlosiloj – pruvo ke slovenoj ja estas honestuloj – kompostisto.

[4] La plej malnova konata universitata sciencisto el niaj vicoj estis Herman el Karintia Slavus, kiu en la 12a jarcento en la francaj kaj hispanaj universitatoj klopodis unuigi en nova granda civiliza sintezo la islaman, kristanan kaj antikvajn kulturojn – F.R.

## Testu Vian Vortstokon:

**floso**
a) kunaĵo de arbotrukoj por transporti en rivero
b) ĉiuj ŝipoj de regno, militŝiparo sub komando de admiralo
c) forta fadeno por purigi la dentojn
ĉ) lavado per abundo de akvo

**impliki**
a) logike enteni, enhavi en si ion ne formale esprimatan
b) kunigi plurajn fadenformajn objektojn, interkrucigante ilin
c) malfaciligi aŭ malhelpi la movojn de io aŭ iu
ĉ) atribui sumon al iu konto

**drivi**
a) veturigi ĉevalon aŭ automobilon
b) forte instigi iun fari ion, frenezigi
c) flosi laŭ la puŝo de akvofluo aŭ vento
ĉ) instrui beston por iu celo

**vulgara**
a) ĝenerala, ordinare uzata
b) malkonforma al la regantaj moroj
c) triviala
ĉ) konforma al la latina traduko de la sankta Biblio

**limako**
a) kvinversa ŝerca poemeto
b) citrusa arbo aŭ ties frukto
c) senkonka surtera molusko
ĉ) flava aŭ senkolora likvo cirkulanta en vaskuloj

**primolo**
a) plurjara herbo kun koloraj floroj
b) honora titolo de ĉefepiskopo en kelkaj landoj
c) malgranda kuirforno bruliganta vaporigitan petrolon
ĉ) misforma, infekta proteino

**ĉerpi**
a) eligi akran sonon, kiel faras iuj insektoj
b) elpreni likvon per la mano aŭ ilo
c) transskribi per sekreta interkonsentita skribosignaro
ĉ) difekti ion, kunpremante kaj farante multajn senordajn faldojn

## Solvoj al la aprilaj kaj majaj Testoj pri Via Vortstoko:

pigra signifas mallaborema.

hordeo estas grajnoj uzataj por fari grion kaj bieron.

helianto estas planto kun grandaj floroj (ankaŭ nomata „sunfloro”.)

metonimio estas stilfiguro kun vort-anstataŭigo (ekz „la poto bolas”).

pedelo estas malsupra oficisto de preĝejo aŭ universitato.

rubeolo estas epidemia malsano

aspergi signifas: ŝprucigi likvon sur iun aŭ ion

katario estas mentodora planto. (Katoj tre amas al odoron.)

pekli signifas: meti iun manĝaĵon en salakvon por konservi

astrolabo estas mezepoka sekstanto

volframo estas blanka, varmimuna, metala elemento, uzata en lumampoloj.

siglo estas la komencliteroj per kiuj oni mallonge esprimas ion (ekz UEA, USA).

glavo estas batalilo kun longa klingo

floso estas kunaĵo de arbotrukoj por transporti en rivero

impliki signifas: malfaciligi aŭ malhelpi la movojn de io aŭ iu

drivi signifas: flosi laŭ la puŝo de akvofluo aŭ vento

vulgara signifas: ĝenerala, ordinare uzata

limako estas senkonka surtera molusko

primolo estas plurjara herbo kun koloraj floroj

ĉerpi signifas: elpreni likvon per la mano aŭ ilo

mantelo estas longa vesto por kovri aliajn vestojn

arakido estas kultivita herbo kiu enterigas la guŝon subteren (ankaŭ nomata „ternikso”)

musko estas eta verda planto sen radikoj kaj kun tufiĝantaj tigoj

efemera signifas mallongdaŭra, rapide pasanta

komuti signifas: laŭvole direkti elektran kurenton en unu cirkviton aŭ alian